

Raporto:

2015-07-28 **Kunveno de AVE okaze de la 100-a UK en Lille**

Dum la UK ni partoprenis la Movadan Foiiron, en kiun prezentis sin pli ol 100 iniciativoj; kaj ni uzis la eblecon de Faka Gicheto.

Manfred salutis la ch. 50 partoprenantojn kaj prezentis koncize AVE-on.

Betty prezentis la trian projekton „**Akvo por Kalima**“ en la provinco Maniema, D.R. Kongo. (bedaurinde mankis komputilo, mi, Manfred, mendis nur projekcion ...). Je la Movada Foiro, dum la Faka Gicheto kaj la AVE-kunveno ni kolektis entute 480 Eurojn por tiu projekto.

Al la AVE-konto avex-z alvenis jam pluraj 100-oj i.a. dank al Betty kaj Catherine. Ni ricevos 5000 denove de WKV AG; sed mankas ankoraŭ ch. 4000. Do, ni petas ankoraŭ vin - la leganto de tiu raporto - por subteno.

Interesa demando estis, ĉu subteni tiun projekton antaŭenigos Esperanton en la DR Kongo? Ni ne certas, sed ĉiukaze ĝi pli-vastigas la informojn pri Esperanto en tiu regiono.

Informoj kaj fotoj trovighas sur nia retejo: verduloj.org .

Rene disdonis informilojn pri „Alternatiba“, pri kiu AVE jam informis - kaj troveblas dokumento sur verduloj.org pri tiu CSO, por subteni klimato-favoran politikon - bonvole serĉu sur la unua ret-paĝo de verduloj.org .

Krome ni parolis pri la agado de AVE en kadro de la Verdaj Partioj, laŭlande kaj tutmonde. Sekvis riproĉoj, kial la Verdaj Partioj sur-papere akceptas Esperanton, sed la politikistoj ne agas por ties enkonduko, ekz- en la Europa Parlamento. Do, fakte ni ja povas uzi la pozitivan sintenon de la Verdaj partioj, eĉ se ne ĉiuj partiaj altranguloj konsentas; sed la bezonatan agadon devas fari ni esperantistoj ene de la partioj - kompreneble tio rilatas ankoraŭ al aliaj partioj.

Aparte menciinde estas, ke **Ulrike Lunacek, membro kaj vic-prezidantino de la EP por la frakcio Verduloj kaj Regionalistoj, salutis la UK-on** - kion ni audis dum la Solena Malfermo.

Supozeble Walter Klag en Vieno tre dankinde instigis shin.

Ursula rakontis ke la franca senatano Joel Labeta de EELV konfirmis al ŝi en la lasta Rio-konferenco, ke li subtenas la ideon de Esperanto.

Michael Leibman, de la francaj Verduloj kontaktos lin. AVE havas ne tre aktivan diskut-grupon „Verduloj“ sur Ipernity.com; aliaj proponis Fejzbukon. Li ankoraŭ diris ke necesos trovi sekretariojn dum la sekva jaro, ĉar Manfred post 25 jaroj finos tiun laboron.
